

ESPERANTO

sub la suda kruco

decembro 2024





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 31[4] numero 156 decembro 2024

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruc estas sendata al membroj de la Aŭstralio Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZE).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZE: esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruc

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

1a de februaro 2025

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2024 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087

SUR LA KOVRILO: *Longa vojo tra la kamparo.* (Parto de Vojo de Sankta Jakobo aŭ "Camino de Santiago") Foto: David Ryan.
Vidu paĝon 23.

ENHAVO

Antaŭparolo	04
KIVA: mono por helpi aliajn	05
Kulturaj kutimoj kaj krimoj	07
Kanti kiel fiŝoj	08
Letero al la redaktisto	09
Poeziangulo	10
La knabino kun la longa hararo (3)	12
Sub Kristnaska abio	17
La aspiro de D-ro Esperanto	18
SATkongreso 2024	19
Tamen estas iom da instruado	20
“Someras” en la kastelo Greziljono	21
Miaj impresoj pri Kanbero	22
Ĉu malkovro en Jakoba Vojo?	23
Vizito al Rumanio	26
Komputila krucvortenigmo	29

Mankas al ni ĉiuj nun la daŭra eldono de la novaĵletero de Roger Springer, *Aŭstraliaj Esperantistoj*. Dum dek tri jaroj, Roger pene elsendis la leteron, ĉiusemajne al kaj aŭstralianoj kaj esperantistoj tra la mondo. Komence por provizi efikan komunikilon inter ni en Aŭstralio, li kreis la retan eldonaĵon. Malgraŭ iufojaj problemoj, li daŭrigis tiun laboron por kunigi la raportojn kaj opiniojn de esperantistoj tra la lando kaj ekster ĝi. Post tiom da klopodo, Roger meritas iom da ripozo. Do, gratulojn al vi, Roger, kaj bonan ripozon.

Kvankam estos neeble anstataŭigi tiun semajnan laboron en tri-monata gazeto, mi deziras revivigi eron, kiu aperis en *The*

Australian Esperantist kaj *Esperanto sub la Suda Kruco* antaŭ jardekoj. (Poste artikoloj aperas foje, sed ne la rubriko). Tiu estas **El la regionoj**. Cele al tio, mi petas al la legantoj tra Aŭstralio kaj Nov-Zelando sendi al ni novaĵon el ties regionoj. Estas kuraĝige kaj grave, ke ni sciu la diversajn agadojn/opiniojn el la regionoj. Raportantoj el la diversaj apartegaj lokoj en niaj landoj gravas.

Per esk@esperanto.org.au vi povas atingi nin, por doni raporteton aŭ artikolon pri via plej ŝatata temo. Parenteze, indas menciigi David Ryan el Nov-Zelando, kiu daŭre sendas la ni artikolojn por ĉiu eldono kaj foje kelkajn. 



Stratangula butiko en Nov-Zelando: Vidu paĝon 7.

KIVA: Kiel elspezi la saman monon multfoje, kaj helpi aliajn

JOANNE JOHNS (MELBURNO)

Inter la multnombraj subgrupoj de Esperantujo, estas unu ĉe la retejo Kiva, kun la celo elspezi monon nome de nia kara lingvo. Sed por kio? Kaj kial?

Laŭ Kiva, estas pli ol miliardo da

komercon. Nun pli ol 5 milionoj da homoj uzis Kiva-pruntojn por ŝanĝi siajn vivojn.

Kiel ĝi funkcias?

• Iu petas mikropronton, ekz. \$1000.



Esperantistinoj en kurda regiono de Irano

homoj ĉirkaŭ la mondo, kiuj ne havas bankkonton. Tio estas miliardo da homoj, kiuj ne havas kreditkarton kaze de krizoj, debitkarton por facila alireblo al sia mono, aŭ kredithistorion por helpi ilin ricevi prunto.

Kiva estas internacia neprofitcela organizo, kiu celas helpi tiujn homojn. Per konektado al homoj tra amasfinancitaj mikropruntoj, Kiva metas la potencon de financa inkluziveco en ĉiuj niaj manoj.

Ĝi komenciĝis en marto 2005, per vivŝanĝa \$500 prunto al uganda virino, por helpi al ŝi pligrandigi sian fiŝvendadan

- Prunta partnero afiŝas la peton ĉe Kiva.
- Vi elektas personon, kaj pruntedonas \$25 (aŭ pli!) por helpi amasfinanci la tutan sumon.
- Kiam sufiĉe da homoj pruntedonas, la petinto ricevas la monon per la prunta partnero.
- Kiam la prunto estas repagata (iom post iom), vi re-ricevas vian monon (iom post iom).¹
- Kiam vi refoje havas vian unuan sumon, vi povas pruntedoni ĝin al nova petanto.
- Tiel via mono povas esti elspezita

Daŭras >

multfoje por helpi multajn homojn!

Mi mem aliĝis al Kiva en 2014, kaj ekde tiam donis la saman \$25 al 11 homoj (ĉiuj virinoj, ĉar mi tiel elektis) el Ekvadoro, Salvadoro, Fiĝio, Kartvelio, Kirgizio, Palestino, Filipinoj, kaj Taĝikio. Per tiu mono ili kleriĝis, pligrandigis komercojn per aĉetado de ingrediencoj, ŝtofoj, brutoj, iloj, maŝinoj ktp, aŭ eĉ ricevis kuracadon kontraŭ longdaŭra malsano. Vi ankaŭ povas helpi homojn pri agrikulturo, arto, manĝo, akvo, rifuĝado kaj multaj aliaj temoj.

Se vi emas helpi, ankaŭ indas aliĝi al la Esperanto-grupo en Kiva, por ke ni povu vidi nian komunan efikon.

Laŭ la priskribo de la grupo: Esperantistoj volas konvinki al aliaj, ke Esperanto signifas amon, pacon, kunsentadon kaj aliajn bonajn ecojn. Kiel sukcesus al ni tion fari? Ekzemple

per bonfaranta kunlaborado.

La ligilo al la grupo estas:
www.kiva.org/team/esperanto.

Nunaj statistikoj de la grupo, ekde septembro 2008:

- 39 membroj
- \$101 505 donita
- 3 650 pruntoj
- 93.6 pruntoj per membro

1 Fojfoje oni perdas iomete pro valuto-perdo, sed se vi bone atentis la detalojn de la prunto, vi povas facile eviti tion ĉi, ĉar ofte la prunta partnero kovros tiun perdon. **E**



Kiva-petanto

Kulturaj kutimoj kaj krimoj

DAVID RYAN (WELLINGTON, N-Z)

Imagu ke alilandulo (eĉ el alia anglalingva lando) vizitas Nov-Zelandon kaj volas aĉeti kafon en kaftrinkejo. Ŝajne facila tasko, ĉu ne? Tamen, jen problemo. Kion oni devas fari? Ĉu:

- a) eniri kafejon, sidiĝi ĉe iu ajn tablo, kaj atendi ke venu kelnero? aŭ
- b) eniri kafejon kaj atendi ĉe la pordo, ke venu kelnero por konduki vin al tablo? aŭ
- c) eniri kafejon, peti kafon ĉe kaso, kaj poste sidiĝi ĉe iu ajn tablo?

Ĝenerale oni faras laŭ c) sed en kelkaj kafejoj, ekzemple en Starbucks, oni devas atendi ĉe la fino de la servotablo dum oni preparas petitan kafon, aŭ, en pli altkvalita kaftrinkejo, oni sidiĝas ĉe tablo kaj alvenas kelnero.

Kiel pagi? Ĉu pagi ĉe la tablo aŭ kaso? Ĉu lasi trinkmonon? Kiel peti fakturon? Ĝenerale en Nov-Zelando oni duone levas montrofingron kaj oni diras *"Excuse me"* ("Pardonu"). En Meksiko, oni alte levas manon kaj ŝajnigas skribi kelkajn vortojn en la aero, kvazaŭ oni skribas fakturon. Ĉiuj meksikanoj komprenas tion, sed ŝajnas strange al alilanduloj, ĉu ne?

Kiam mi vojaĝas, la necerteco pri tiel facilaj aferoj ĉiam ĝenas min. Antaŭ mia vizito al Italio en aŭgusto de 2024, mi vidis multajn filmetojn en YouTube pri kiel peti kafon, ĉar kaftrinkado estas afero kiu dependas multe de la loka kulturo. Laŭdire, peti kapuĉinon post la 11a matene estas granda kultura krimo en Italio, ĉar kapuĉino estas nur matenmanĝa trinkaĵo kaj nur eksterlandaj turistoj trinkas laktoplenan kapuĉinon en la posttagmezo!

En Italio oni povas peti kafon por trinki starante antaŭ la servotablo (malantaŭ kiu laboras kafisto kaj sur kiu troviĝas

kafmaŝino kaj kaso) aŭ ĉe tablo. Verŝajne estas alia granda kultura krimo se oni petas kafon ĉe servotablo por tiam sidiĝi ĉe tablo, ĉar prezo de kafo, kiun oni trinkas ĉe tablo estas pli alta ol kafo, kiun oni trinkas antaŭ servotablo (kompreneble ĉar kelnero devas poste purigi tablojn ĉe kiuj sidis klientoj).

Pensu ankaŭ pri vizitanto al Nov-Zelando, kiu volas aĉeti dolĉaĵon. Oni aĉetas ĝenerale ĉe malgranda stratangula butikio, sed kiel tia butikio nomiĝas en Nov-Zelando? Oni nomas ĝin *"dairy"* ("laktovendejo"). Tiu estas stranga vorto. Mi imagas ke antaŭ multaj jardekoj oni vendis tie nur produktojn el lakto, sed nun oni vendas multajn diversajn produktojn. Tamen, oni uzas ankoraŭ la vorton *"dairy"*. Imagu ke oni dirus al vizitanto kiu deziras aĉeti dolĉaĵon: "Iru al la laktovendejo ĉe la stratangulo." La vizitanto furioze respondus: "Ne, mi ne volas aĉeti lakton, mi volas aĉeti nur dolĉaĵon!".

En Anglio oni ofte uzas la vorton *"newsagent"* aŭ en Kanado ŝajnas ke oni diras *"corner store"* aŭ *"convenience store"*. Kaj en Aŭstralio? En mia lernejo en la 80aj jaroj, instruisto el Aŭstralio ofte parolis pri *"milk bar"* kaj ni ĉiam ridis pro tio, ĉar ni tute ne uzas tiun vorton en Nov-Zelando. Ĉu tiu nomo ankoraŭ uzatas en Aŭstralio?

Ne nur lingvo estas barilo al internacia komprenado. Ĉiuj landoj, eĉ kun sama lingvo, havas proprajn kutimojn, kiujn oni devas lerni. 🇬🇧



Kanti kiel fiŝoj

DONALD ROGERS (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)

Esplorante por sia libro, *Sing like fish*, aŭtoro Amorina Kingdon diris, ke foje ŝi ne estas komforta dediĉante tiom el sia vivo al subakva sono. Spite al ĉiuj miroj kaj ĝenoj de la temo, estas vere, ke bruo ne superas la profundan minacon al la oceanoj pro klimatoŝanĝiĝo. Tamen, neniu afero ekzistas en vakuo. Varmiĝantaj aŭ acidiĝantaj akvoj kondukos sonon malsame: la efiko de sono je ekosistemoj, kiel rifoj aŭ arktaj nutroretoj, resaltos en bestaj reagoj al klimata ŝanĝiĝo.

Ŝi ankoraŭ kredas, ke neniam estas tro malfrue ekzameni la mondon per nova lenso, per nova senso. Submare, sono kondukas malsame ol en la aero. Ĝi moviĝas pli longe, pli rapide, kaj atenuiĝas malpli rapide. Ni ne aŭdas tiel, kiel bestoj aŭdas


submare; ni ne kapablas. Tiun fakton ŝi trovas trankviliga kaj ekscita. Submaraj bestoj montras al ni, ke la ilo, kiun ni nomas orelo estas nur unu ilo por percepti sonon. La vasta nombro da akvaj specioj konektas al partiklaj moviĝoj anstataŭ al

premo – tute alia aspekto de sono. Eble tio ŝajnas nur semantika diferenco. Sed imagu la diversajn interagojn inter ondoj en ondobaseno – konstantaj ondoj kaj aliaj fenomenoj – kaj vi komencos vidi (aŭ aŭdi) la eblecojn. Kiel tio aspektas? Ankaŭ mirigas ŝin la emerganta scienco pri vibra komunikado. Ĝi ligas tuŝon kaj

sonon, uzante strukturojn kiel flankaj linioj¹. Kaj dume, miru ke tiuj harĉeloj² atestas al la profunda evolua historio pri mezuri sonon subakve. Ni faris tion dum tre longa periodo.

Ĉi tiu scienco akceliĝas, finfine, kaj ni ekkomprenas, mezuras, kaj konsideras sonon subakve kie ni ne observis ĝin antaŭe. Estas ankaŭ alloge studi ĝin pro alia kialo: ĉar bruo ŝajnas esti facile riparebla poluaĵo.

Sed tio ne ĉiam pravas. Certe “purigi” bruon estas pli facile ol, ni diru, purigi naftan verŝadon. Sed kapturiniĝantaj omaroj, kontuzitaj eskalopoj, kaj konfuzitaj mamuloj atestas, ke bruaj damaĝoj povas esti subtilaj kaj longe daŭraj. Ni ne atendu



evidentajn respondojn aŭ rapidajn riparojn. Bruo ofte estas akumulanta problemo ĉe bestoj, kiuj jam estas streĉitaj, malsataj aŭ malsanaj. Kaj honeste, iafoje bruo ne estas problemo. Multaj bestoj jam adaptiĝis aŭ povas adaptiĝi aŭ ne estas afliktitaj.

Do kion ni faru? Sciencistoj laboras por plenigi la mankojn pri kio gravas al senvertebruloj kaj kiel niaj bruoj kaj vibroj influas ilin. Tio necesigas mezuri la partiklan moviĝon de sono, ne nur ĝian premon, kaj rigardi ankaŭ la marfundajn vibrojn.

Esploristoj uzas novajn teknologiojn, ekzemple artefaritan intelekton, por rapide pritrakti enormajn akustikajn dosierojn. Ili strebas akiri bonajn datumojn el regionoj kiel la Arkto kaj la profunda maro, kiuj ebligas al ni lerni pli pri tiuj relative nepoluitaj medioj, uzante multajn kadrojn: sonajn pejzaĝojn, bazlinian registradon, detalajn kampajn mezurojn.

Sciencistoj enkorpiĝas sonon en sian laboron, kaj bioakustikistoj daŭras enfosi en tio, kiun la kompleksaj blekoj de marbestoj povas informi nin pri siaj vivoj. Oni konstruas datumbazojn, ellaboras novajn metrikojn, kaj eĉ kunlaboras kun artistoj por prezenti la aferon al la publiko. Kaj, baldaŭ, ili decidus ŝlosilajn aferojn pri gvidosignaj reguloj.

¹ Flanka linio estas sistemo de sensaj organoj troviĝanta en akvoloĝantaj vertebruloj, uzata por detekti movon kaj vibradon en la ĉirkaŭa akvo.

² Harĉeloj en la orelo detektas sonon.

Referenco

Amorina Kingdon, *Sing like fish: how sound rules life under water*, Scribe Publications, Australia, 2024, p 244-6



Letero al la redaktisto

Ĉu libera volo?

Mi dankas Jonathan pro interesa prezento de tiu demando, ĉu ni havas liberan volon aŭ estas daŭre direktataj de fortoj, kiujn ni ne komprenas sed ne povas rezisti. La demando revenigis min al periodo, kiam mi faris al mi tiun demandon kaj alian: "Mi vidas bluan ĉielon kaj vi diras, ke vi vidas bluan ĉielon. Sed ĉu vi kaj mi vere vidas la saman objekton, aŭ ĉu ni aplikas la samajn vortojn al bildoj, kiuj eble ne identas inter si."

Tiel filozofoj ŝatas demandi, kaj ja estas



interesa okupiĝo. Sed ni homoj estas estuloj, kiuj vivas, kvazaŭ la demando pri libera volo estus sensenca. Se ni ne havas liberan volon, ne eblas laŭdi aŭ mallaŭdi agojn de homoj. Ĉu Hitler kaj Stalin estis robotoj de eksteraj fortoj, aŭ ĉu ili respondecis pri siaj agoj? Ĉu

Francisko de Asizo estis bona homo aŭ siaflanke simila roboto?

Ĉu ni havas liberan volon aŭ ne, ekscitas filozofojn, sed la demando estas decidita por "normalaj homoj".

Trevor Steele, Adelajdo

MATTHEW POWER

studante kanjion

flosante laŭ la Flava Rivero sur
aermatraco, la femuroj
de la Tero envolvas ĉirkaŭ min, farante
aerobikon.
Ĉi tie mi studas ostojn kaj testud-
karapacojn
de nekonataj poetoj kaj resanigantoj.
Aŭgurado.
Je 34 jaraĝa mi reiras al lernejo en
ermitejo kun
herbaj matoj kaj fora stereofono.
Kraĵonoj kaj ovomusa komputilo.
Kartoj kaj libroj kaj testudoj, testudoj
ĉie. Ĉe la templo
de lunlumo sur la vojo, kie ne estas
templo, nur lunlumo, estas grandega
ŝtona
testudo kun obelisko sur la dorso,
gravurita per
ostoriveraj poemoj. Erodante. Panjo
telefonas kaj
diras al mi, ke ŝi havas unu el stanaĵo
sen vosto sed
kion tio signifas? Mirindan bonŝancon
oni diras al mi,
10 000 jaran, kaj eĉ testudoj rampantaj
sur la strando
estas ege dankitaj pro siaj vizitoj kaj
donitaj
tason da sakeo. Sed tiam vi devas
foriri, aŭ salti
sur lian dorson kaj iri sub la ondojn al
kie ili
festas por ĉiam kaj ĉiuj ĉehejme
maljuniĝas.

studying kanji

floating down the Yellow River on a
lilo, the thighs
of the earth spread around me, doing
aerobics.
Here I am studying bones and tortoise
shells
from unknown poets and healers.
Divination.
At 34 I'm going back to school in a
hermitage with
grass mats and remote stereo. Pencils
and eggmouse computer. Cards
and books and tortoises, tortoises
everywhere. At the temple
of moonlight down the road, where
there's no
temple, only moonlight, there's a huge
stone
tortoise with an obelisk on its back,
cut with
bone river poems. Eroding. Mum
telephones and
tells me she has a pewter one without
a tail but
what does it mean? Wonderful good
luck I'm told,
10,000 years, and even turtles crawling
up the beach
are thanked profusely for their
visitation and shouted
a cup of sake. But then you have to
leave, or jump
on his back and head under the waves
to where they
party forever and everyone at home is
growing old.

La plej nova vivo de Matthew Power estas kiel psikoterapiisto pri traŭmovivanta en Townsville, Norda Kvinslando. En antaŭaj versioj de ĉi tiu vivo, li estis instruisto en Aŭstralio kaj Japanio, komunista ĵurnalisto, kaj vivis dum kvar jaroj en budhana meditada centro.

Matthew Power's latest life is as a trauma psychotherapist living in Townsville, North Queensland. In previous versions of this life he has been a teacher in Australia and Japan, a communist journalist, and lived for four years in a Buddhist meditation centre. 



Matthew Power

Elĉerpaĵo 3 el membiografio de Catherine Gluck: La knabino kun la longa hararo

TRADUKITA DE TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

Iom pri la verko: Pasintan jaron, kiam mi vizitis Esperanto-Domon en Sidnejo, mi rimarkis sur tablo libreton neimponan. Trafoliante ĝin, oni ne trovas ligon al Esperanto escepte, ke Kep Enderby verkis la enkondukon por ĝi. Mi memoras la nomon de la aŭtorino, ĉar en la 1990aj jaroj ŝi heredigis sufiĉe grandan sumon al la Esperanto-Federacio de NSK. Do mi portis la libreton hejmen kaj post legado pensis, ke valoras traduki ĝin memore al Catherine Gluck.

Catherine naskiĝis en Hungario en 1906 kaj enmigris Aŭstralion en 1950. Jen iom el la traduko.

Hungara strando

Mia edzo kun sia amiko estris la konstruadon de feriejo en la Budapeŝta ĉirkaŭurbo, Római Fürdő, apud la Danuba rivero. Ĝi konsistis el 120 feriaj kabanoj, ĉiu kun nomo de hungara urbo, kaj 120 boatremizoj. Ĝi havis ankaŭ boatoriparejon kaj la plej grandan olimpikan freŝakvan naĝejon. Je varma semajnofino alvenis eĉ pli ol 5000 naĝantoj. Ĝardenisto prizorgis la florobedojn ĉirkaŭ la naĝejo kaj la belan floran mapon de Hungario antaŭ nia oficejo. La feriejo nomiĝis Hungara Strando. (*Strand* estas ankaŭ hungara vorto kun la sama signifo.) Estis subĉiela restoracio sur la danuba flanko, kiu dungis kvinpecan orkestron kun afrikdevena tamburisto, la unua en Budapeŝto. Malantaŭ la longa vico de kabanoj kaj ĉambretoj por ŝanĝi vestojn, estis gazono kun multaj fruktarboj por piknikantoj, kaj kabanoj el tegtabuloj por feriantoj kun infanoj kaj hundoj. Laŭ la Danubo estis dek ok aliaj boatoremizoj, tamen neniuj havis taŭgan naĝlokon. La posedantoj, estrantoj kaj stabo de tiuj estis amikema aro kaj ĉiun jaŭdon ni renkontiĝis por kune manĝi kaj diskuti financajn aferojn.

Inter aprilo kaj aŭgusto ĉiujare ni loĝis ĉe la feriejo. Béla Gluck, mia edzo, estis la estro de la feriejo. Mi estris la kvin biletistojn, du ĉe la danuba enirejo kaj du ĉe la enirejo Római Fürdő, plus unu, kiu ĉirkaŭvagus vendante biletojn por longaj seĝoj, bantukoj aŭ naĝkostumoj. Merkredo estis mia feria tago. Mi foriris frue en la mateno al la urbocentro por tagmanĝi kun mia patrino. Estis strange sinvesti por la urbo post tagoj de nur naĝkostumo. Mi kontrolis nian apartamenton en la urbo, kolektis la poŝtaĵojn, revenis posttagmeze per pramo kaj naĝetis antaŭ ol komenci la laboron. Apud la restoracio ĉe la danuba flanko, ni havis pormuzikan pavilonon estratan de geedzoj. Mia plej ŝatata kanto estis *La Cumparsita* kaj kiam la geedzoj vidis min revenantan de la urbo, ili ludis tiun kanton per disko. Tiel mia edzo sciis, ke mi revenas. Se iu petis ludi tiun diskon dum mia foresto, oni ĝentile neis.

Ni ofte festis sur nia jakto, *Cinka*, kiu povis porti 32 personojn. Ĝi estis la posedajo, kiun oni unue konfiskis ĉar ni estis judoj.

Mia socia vivo komenciĝis post mi edziniĝo. Antaŭe, hejme ni estis izolitaj kaj mankis al ni la sociuma vivo de la urbo.

Estis ĉiam la kvaropo de nia familio kaj ni ne sentis la bezonon renkonti aliajn societe. Nelonge post mia edziniĝo, ni amikiĝis kun kvar junaj partneroj kaj kune organizis renkontiĝojn.

Dum vintro ni ĝuis aktivan societan vivon. Ni ludis briĝon, ĝuis teatraĵojn, muzikaĵojn, noktoklubojn, koncertojn, kaj skiis en la montaro. Tiam estis mirinda kaj feliĉa tempo en mia vivo. Mi ĝuis

dancadon kaj ricevis premiojn por angla valso kaj tango. Mia plej ŝatata danco estis la hungara *csárdás*, kiu komenciĝas per malrapidaj paŝoj kaj laŭgrade rapidiĝas ĝis fino de ellaciĝo kaj forta spirado. Mi ankoraŭ sentas nostalgie, pensante pri la muziko kaj ritmo de tiu unika danco.

lun vesperon ni vespermanĝis ĉe laŭmoda restoracio kun geamikoj. Jam

Daŭras >



Bordo de Rivero Danubo, Budapeŝto, 1955

estis grupo manĝanta ĉe apuda tablo. Tiutempe en Budapeŝto okazis fama proceso en la kortumo, kaj la rezulto de tiu dependis de analizo de manskribo. La proceson bone raportis la tagĵurnaloj. La proceso postulis, ke grafologo estu dungita, kiu havas nenian antaŭan scion pri la kazo. Grafologo el Vieno venis por analizi la manskribon. Li estis kun la grupo ĉe la apuda tablo. Liaj amikoj instigis lin analizi ies manskribon, sed tiu devis esti nekonato de li. Li fingromontris al mi kaj diris: "Mi analizos la manskribon de tiu junulino.". Li alproksimiĝis al nia tablo, prezentis sin kaj informis, ke li deziras nur iom da mia manskribo. Kompreneble ni ĉiuj ekscitiĝis. Li petis la permeson de mia edzo, kaj tiam donis al mi notpaperon sen linioj aŭ ion ajn sur ĝi. Li diris, "Mi petas, skribu la vorton Budapeŝto", kion mi faris. Ni ĉiuj anticipis lian opinion. Li staris kaj deklaris: "Se mi estus landestro aŭ estrus firmaon aŭ fabrikon, mi dungus tiun junulinon por helpestri, ĉar ŝi estas bonega organizanto."

Bobenjo Gluck

Mia edzo deziris, ke mi havu hundon, sed hundoj timigis min. Se hundo estis sur unu flanko de vojo, mi ekkuris al la alia flanko. Iun tagon la pordsonorilo eksonis kaj kiam mi malfermis la pordon, mia edzo staris tie kun manoj ĉe sia dorso. Mi demandis, ĉu li perdis la ŝlosilojn. Li respondis, ke ne, kaj eniris kun eta dratohara terhundo. Li diris al mi, ke verŝajne ĝi perdiĝis, ni prizorgos ĝin dum tagoj, metos reklamon en ĵurnaloj, kaj la posedanto riĉe rekompencos nin. Tiam li ĝentile helpis min mane karesi la etan hundon. Ĝi estis amikema hundeto. Baldaŭ mi amikiĝis kun ĝi, kaj kiam mia edzo perdis intereson pri ĝi, ĝi iĝis mia hundo. Ni nomis ĝin Bobenjo. Mi ne riskis eliri kun ĝi kaj ne riskis eĉ respondi la

telefonon, ĉar mi timis ke la "posedanto" reposedos ĝin.

Mi edzo havis dosieron en sia tirkesto kun etikedo "privata". Monatojn poste mi devis kontroli ion en dosiero kaj supre estis la rasdeveno de eta Bobenjo. Nia bona amikino estris hundejon kaj mia edzo aĉetis Bobenjon tie. Ĉiuj sciis krom mi.

Post du jaroj oni diris al mi, ke Bobenjo bezonas kunulon, alie ŝi blindiĝos. Ni aranĝis la renkonton kaj baldaŭ Bobenjo estis graveda. Mi aĉetis blankan banujeton kaj plenigis ĝin per lakto. (Bobenjo kutime ne trinkis lakton, sed dum sia gravedeco ŝi rapide malplenigis la banujeton.) La kompatinda etulo tre timis, speciale kiam la naskado alproksimiĝis. Korbo estis metita sub la pianon, kaj mi restis kun ŝi, karese palpante ŝin kaj parolante al ŝi. Dum ŝi rigardis min per grandaj, timplenaj okuloj, mi konsolis ŝin. Por ŝia naskado mi estis tute preta, kun vato, tondilo, ktp, kiel mia amikino de la hundejo rekomendis. Je la dua matene la unua hundido naskiĝis en ia balono, kiun mi devis tondi rapide kaj involvi la hundeton en la katuna lano. Tiam mi kuris al la dormĉambro por informi mian edzon, kiu duondorme aŭdis la mesaĝon kaj ree ekdormis. Baldaŭ naskiĝis la dua kaj tria hundidoj. Eta Bobenjo malfortiĝis, elĉerpiĝis, kun tri hundidoj suĉantaj senĉese. Bobenjo ricevis multajn gratulojn, eĉ leterojn adresitajn al Bobenjo Gluck kun bondeziroj. La tri hundidoj baptiĝis kaj tiu evento bezonis feston por celebri. Chester, la unue naskitan ni donis al la posedanto de la "patra hundo" kiel antaŭe aranĝita. Bobenjo estis mizera dum tagoj post la perdo de unu el la hundidoj. Mi aĉetis longan ruĝan hundrimenon kun tri mallongaj rimenetoj por promenigi la hundojn. Preterpasantoj haltis kaj admiris la scenejon.

Malbenu Trianon

La 20a de aŭgusto estas la tago de Sankta Stefano, la unua reĝo de Hungario, kiu estis kanonizita de la tiama Papo. La tago estis publika ferio kaj ĉiun jaron, inter aliaj celebraĵoj, estis motorboata konkurso sur la Danubo. Gejunuloj prilaboris siajn boatojn per floroj, ornamaĵoj kaj tabuloj kun ridigaj aŭ interesaj montraĵoj sur ili por celebri la tagon. La konkurso laŭiris la Danubon ĉirkaŭ grandan jakton, kie juĝantoj rigardis la eventon per binokloj. Unu el niaj konstantaj luanĵoj invitis min akompani lin en sia motorboato, ĉar li bezonis malpezan pasaĝeron. Li pensis, se bone konata persono, kiel mi estus en lia boato, li gajnus premion. Ĉar estis la naskiĝtago de mia edzo, mi ne deziris fari tion, sed la junulo konvinkis mian edzon kaj mi konsentis. Estis varmega tago kaj mi vestis min nur per naĝkostumo. La ornamaĵoj sur la boato estis floroj kaj tabulo kiu anoncis "Malbenu Trianon", kaj tiuj estis iom pezaj por la malgranda boato. Estis en Trianon, Francio, post la Unua Mondmilito kie oni subskribis pactraktaton, kiu forprenis teritoriojn de Hungario. (Hungario konsekvence perdis du trionojn de sia teritorio, unu parton en la okcidento al Aŭstrio, unu parton en la sud-okcidenta al Jugoslavio, unu parton en la nord-orienta al Pollando, Rusio kaj Ĉeĥoslovakio.) Jen kial "Malbenu Trianon". (Estis ankaŭ protestoj, marŝadoj kaj propagando en ĵurnaloj kontraŭ la traktato en Trianon.) Je la lasta momento motorinĝeniero ensaltis la boaton.

Je la sono de la komenca hupo ni ekiris. La suno brilis kaj la svingomoviĝo de la boato plaĉis al mi. Ekŝanĝiĝis la vetero. Per forta, malvarma vento kaj pezaj ondoj, nia boato iĝis kiel ludilo, viktimo de turbula rivero. Ni alproksimiĝis

al la boato de la juĝantoj, sed ni ne povis stiri al ĝia pruo ĉar la vento kontraŭis nin. Nia boato renversiĝis, mi falis dekstren kaj la du junuloj maldekstren. La ŝnuro de la motoro envolvis miajn piedojn kaj piedfingrojn. Malgraŭ granda strebo, mi ne povis atingi la surfacon pro la peza motoro pendanta de miaj piedoj. Mi ne scias kiel, sed en kelkaj sekundoj mia tuta vivo preterpasis kaj mi certis, ke mi ne vidus teron iam ajn. Iel polica savteamo alvenis, tenis miajn naĝkostumajn rimenojn kaj eltiris min el la akvo. Mi tremetis, malvarmis kaj komencis tremadi senĉese kaj mi estis plena je akvo. Oni helpis min elvomi multan salakvon, dum longa tempo.

Samtempe alarmsignaloj elsendiĝis kaj mia edzo, lia patrino kaj ĉiuj ektimis kaj ne sciis kion fari. Mia edzo telefonis al la polica sur-akva teamo sed ili respondis, ke ili havas nur knabineton, kiun ili savis, kaj al kiu ili jam donis brandon kaj nun ŝi dormas. Ĉiuj pensis, ke mi estas sur la fundo de la Danubo. Kiam la policanoj vekis min kaj demandis mian nomon ili surpriziĝis ekscii, ke mi estas la edzino de Béla Gluck, estro de la populara Budapeŝta Strando. Ili provis retelefoni mian edzon sed la linio estis okupata. Mi petis al la policanoj veturigi min hejmen malgraŭ la kosto. Mi ne nur tremis kaj malvarmiĝis sed estis sango fluanta laŭ miaj gamboj. Baldaŭ la policanoj veturigis min hejmen volvitane en du pezaj kaj malbonodoraj lantukoj. Estis feliĉa aro krianta, kiu bonvenigis min.

Oracio

Lajos Bakti, unu el la najbaraj boatejaj posedantoj, invitis nin celebri mian saviĝon la sekvan tagon. Estis longa tablo plena de manĝaĵo kaj tridek invititoj sidis ĉe ĝi. Centre de la tablo estis

Daŭras >

dekoraciita sarkofago kun rubandoj, floroj kaj enskribaĵoj. La gastigantoj stariĝis kaj oraciis: “Ĉi tie kuŝas nia kara amikino, Catherine.” Kaj tiam li menciis miajn virtojn. Ni ridis dum la tuta nokto. Ĉiuj kisis min kaj deziris al mi longan vivon.

Multajn jarojn poste, dum vizito al Hungario de Aŭstralio, mi trafis pramŝipon de Budapeŝto por viziti la lokon iame konatan kiel Budapeŝta Strando. Oni konfiskis ĝin de ni en 1939 laŭ leĝo, kiu ne permesis, ke judoj posedu privatan propran. Mi iris al la boatejo kaj eksciis, ke ne multe ŝanĝiĝis – ĝi estis same kiel kiam mia edzo konstruis ĝin kun kelkaj boatbretoj ĝis la subtegmento. Juna viro ĉeestis poluranta la boatojn. Li rigardis al mi kaj demandis, ĉu li povas helpi min. Mi respondis, ke mi deziras nur rigardi. Li demandis, “Kial?” Senpense kaj senhezite mi diris al li, ke mi “memoras kiam ĝi estis nia propraĵo.” Ĉar li estis junulo, plenkreskinta dum la komunisma epoko, li ne akceptis, kion mi diris. “Ĉi tio neniam estis privata propraĵo, vi estas freneza.” Mi turniĝis kaj forlasis la junulon, kaj trafis la unuan pramŝipon reveni al la urbocentro.

Bakelita produktoj

Alexander, kun mia edzo kiel komercpartnero, malfermis malgrandan fabrikon, uzante novan materialon importitan el Belgio, nomatan bakelito. Komence ili fabrikis malgrandajn elektrajn partojn, kiel elektringojn, konektilojn, ŝaltilojn, ktp, en bruna koloro. Kiel pli sensacia produktaĵo, ili fabrikis pudrujojn kun bildo de anĝelino, kun floroj en la manoj, sur la kovrilo. Ĝi estis tre alloga, kaj la kovrilo firme entenis la pudron. Kiam internacia ekspozicio okazotis en Budapeŝto, Alexander luis budon. Sed kiu prizorgu ĝin? Li ne havis monon por dungi iun, nek fidis iun por fari la laboron.

Do devis esti mi kiu faros.

Alexander kaj Béla havis proksimume 100 sakojn da bruna bakelita polvo sed nur 5-6 sakojn da kolorigita bakelita polvo. La pudrujo estis alloga kaj populara, sed kiu dezirus brunan pudrujon? Ne estis sufiĉe da kolorigita bakelita polvo en la stoko. La brunaj elektraĵoj facile vendiĝis. Alexander panikiĝis. Je la malfermo de la ekspozicio, kiam oni liveris la stokon, mi metis la brunajn elektraĵojn ĉe unu flanko de la tablo kaj la kolorajn pudrujojn ĉe la alia flanko, kaj inter tiuj kelkajn brunajn. Tiuj elstaris inter la ruĝaj, verdaj kaj bluaj. Tuj kiam bruna pudrujo vendiĝis mi remetis alian brunan. Homoj estas strangaj. Ili deziras havi la raran, kiun aliaj ne havas. Je la fino de la tago ne restis bruna pudrujo, sed multaj koloraj pudrujoj restis.

1933 La morto de patrino – mi lernis la anglan

Je la 23a de junio 1933 patrino mortis subite. Mi tagmanĝis kun ŝi merkrede, kaj vendrede ŝi ne plu vivis. Kompatinda patro, ekstere li sintenis forte sed ene li suferis infere. Post mia edziniĝo Fred kaj patrino intime rilatis. Li vere estis la filo de patrino. Kvankam li havis plurajn amikinojn, Patrino estis ĉiam la unua por li. Kiam ŝi mortis, postrestis malfeliĉo ĉe Fred. Oni ne povis konsoli lin, li evitis homojn kaj elserĉis religion. Li ne plu estis gaja knabo.

Je tiu tempo rakonto en ĵurnalo allogis mian atenton. Fama hungara aktorino havis inviton al Holivudo, kaj ŝi dungis anglan profesoron por instrui al ŝi la anglan. Mi akiris la adreson de la profesoro kaj mi skribis al li, demandanta, “Ĉu vi povos instrui min?” Li respondis, ke li estas tro okupata kaj ne planas havi aliajn studentojn. Li respondis ankaŭ,

ke li postulas altan koston por instrui, dekoble la normalan. Kiam mi informis lin, ke mia patrino ĵus mortis kaj mi serĉis ion por distri min por ke mi ne ploru, li respondis, "Mi donos al vi provlecionon kaj ni konsideru." Post la provleciono li ridetis kaj diris, "Vi estas ideala studanto; mi instruos vin." Post kelkaj lecionoj li diris, ke la lecionoj ne sufiĉas, kaj mi devas praktiki la lingvon. Tiam li diris, ke li

havas tro da enketoj pri lecionoj, kiujn li ne povas instrui, do li rekomendos min al tiuj enketintoj. Tiel mi havos ŝancon relerni la lecionojn dekomence. Mia lernonivelo estis nur kvin aŭ ses lecionoj preter tiuj de la komencantoj, sed la situacio estis signifoplena kaj praktika por mi. Kompreneble, mi postulis multe malpli ol la profesoro. **E**

Sub Kristnaska abio

El la poemo-teatraĵo en la poemaro

"La vagabondo kantas" (1937) de Julio Baghy

Estu bona la Novjaro:
plimultiĝu la membraro,
havu sanon, forton, monon
mondkongreson, lingvokonon!
Vin evitu jenaj plagoj:
geedziĝoj, mortotagoj,
prezidanto lingve muta,
kursgvidanto nur balbuta,
grupa kaso deficitita,
ambicio venĝospita,
libroŝranko ĉiam plena,
redaktoro reformema,
plialtigo de l' kotizo,
la problem' prl l' organizo,
mondmigrantoj dum kunsidoj,
politikaj cirkumcidoj.
Regu inter vi la Dio
sen diskut' pri l' religio.

E



Julio Baghy

La aspiro de D-ro Esperanto

ZHANG FUDE (VIRTO) (ĈINIO)

En la komenco,
La aspiro estis malgranda riveret'
Kiu venis el Bjalistoka vilaĝet'.
Aspekte de ŝi kvieta kaj senonda,
Interne de ŝi pasia kaj mar-onda.
Jaron post jaro,
La aspiro estis printempa pluvero
Kiu gutis senbrue al l' vasta tero.
Senĉese ŝi nutris la sekiĝajn plantojn,
Milde ŝi karesis la penajn strebantojn.
Pasis jarcento,
La aspiro estis jam nova bambuo,
Burĝonante libere kaj sen enuo.

Netimante hakadon kaj ventvipadon
Ŝosis ŝi senhalte direkte l' celadon.
En nuna tempo,
La aspiro estas staranta arbego
Kiu enradikiĝas en la firma ter'.
Gardas ŝi per sia grandega ombrego
Esperantistojn kun ideal' kaj fier'.

Kvankam en malsamaj landoj vivante
La saman ĉielon ĉiam ni vidas.
Feliĉe ni parolas Esperante,
La sama lingvo gefrate nin ligas.
Al la celo de lingva egaleco,



Bjalistoko, 1922

SATkongreso 2024

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

La 97a SATkongreso okazis en la urbo Oporto en Portugalio de la 5a ĝis la 11a de aŭgusto 2024. La elektita kongresejo estis tre agrabla loko nomata Quinta juvenil dos Salesianos, kiu estas centro kie katolikaj junuloj kunvenas. Ĝi estas iom ekster la urbo sur monteto, tamen la centro de la urbo facile atingeblas per trajno, buso aŭ metroo. Ĉirkaŭ la konstruaĵoj estis granda parko. Do oni sentis sin iom en la naturo. Ĉeestis inter 80 kaj 90 esperantistoj de deko da diversaj landoj.

Ĉi tiu jaro estis la kvindekjariĝo de la revolucio de diantoj, do oportuna momento por paroli pri la historio de Portugalio kaj kompreni kiel eblis, ke la ŝanĝo de diktaturo al respubliko okazis sen sangoverŝado. Konforme al la celo de SAT, gravas ke la kongreso estu oportuno ekscii pri la vivkondiĉoj de la lokanoj aparte la laboristoj. Pro tio estis ekskursoj al:

A. la iama malliberejo de Oporto, kie estis enkarcerigitaj la kontraŭstarantoj al la diktaturo kaj kiu nun estas armea muzeo;

B. la urbo Ilhavo, de kie foriris ŝipoj por kapti moruojjn;

C. la urbo Aveiro, kie oni rikoltis salon;

D. la urbo San Pedro da Cova kie ni vizitis la ministan muzeon konstruitan en la amasloĝejo de la iama min-kompanio. La rimarkinda afero pri la eksaj ministoj estas ke, kiam la minejo fermiĝis, ili sukcesis akiri la arkivojn por pruvi kiom longe ili laboris en la minejo – gravaj dokumentoj rilate pension aŭ helpon pro sekva malsano.

En ĉiu ekskurso ni povis paroli kun lokanoj, kiuj spertis aŭ arestadon aŭ la vivon de morukaptisto. Kvankam necesis interpretisto de la portugala, estis interese havi rektan kontakton kun la travivintoj de la eventoj.

Daŭras >



Krom la laborkunsidoj okazis prelegoj:

- pri franca populara kanto de la sepdekaj jaroj, kiu fariĝis la himno al libereco kaj demokratio de koreaj manifestaciintoj;
- pri ĉifrovalutoj kiel bitmono aŭ monero;
- pri la libro Volontuloj kun okulvitroj, atestoj de du eksterlandanoj, kiuj prenis parton en la hispana enlanda milito.

Kompreneble okazis ankaŭ distraj vesperoj kun muziko, kantado formalaj kaj neformalaj en la korto kun glaso da loka vino.

Konklude mi diru ke, dank' al tiu kongreso, eblis ekscii multe pri la lando kaj pasigi agrablan semajnon en amikeca etoso en kaj ekster la kongreso. 

Tamen estas iom da instruado

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Antaŭ kelkaj jaroj oni petis min gvidi per Zoom klason da azianoj. Fakte preskaŭ duono de la nuna klaso, kiu estas kreskanta laŭ nombro, estas eŭropanoj kaj afrikanoj. Jen miraklo de la moderna teĥniko: ni estas en plej diversaj partoj de la mondo, kaj tamen alparolas nin, kvazaŭ ni estus en unu ĉambro. (Ho jes, foje la teĥniko ne perfekte funkcias, sed ĝenerale ĝi estas granda beno.) En la grupo estas preskaŭ 20 homoj.

Unu el la klasaninoj, kurda virino en Irano, ne plu povis ĉeesti la klason, ĉar post longa serĉo ŝi ricevis laboron, kaj en Irano nur vendredo (la kurso okazas sabate) estas ferio. Ĉar ŝi estas ŝlosila persono por nia lingvo en la kurdaj regionoj, mi donas al ŝi privatajn lecionojn vendrede. Ankaŭ al loka universitata studento mi donas semajnajn lecionojn. Andrew Woods kaj mi renkontiĝas ĉiudimanĉe kun junulo (kaj lia amikino), kiu eksciis pri Esperanto pere de retpaĝa invito.

Antaŭ nelonge klasanoj instigis min okazigi ĉiun duan semajnon kurson kun

la titolo “Ĉu vi emas verki?” Persone mi dubas, ĉu eblas instrui verkadon. Oni devas dum iom longa tempo strebi plibonigi sian skribtalenton, poluri sian stilon, ekzerci sian fantazion – kaj eventuale ricevi inspiron de aliaj verkistoj. Sed mi pretas provi atentigi la kursanojn pri diversaj aspektoj de tono, rakonta vidpunkto (ĉu okulo-de-Dio, ĉu unuapersona), ĉu oni uzu la pasintan aŭ prezencan tensecon aŭ eĉ futuran, ke oni metu literaturan “karnon” sur rakontan skeleton. Partoprenas ĝis nun 14 homoj el tri kontinentoj.

Kaj ĵus komenciĝis kurso por sidnejaj lernemuloj, ankoraŭ ne progresintoj, organizita de Dmitry Luŝnikov. Ĝis nun okazis nur tri lecionoj, kompreneble interrete.

Mia intenco estas informi, ke eĉ se estas ne aparte aktiva periodo por Esperanto en nia lando, tamen io okazas. Se iu volas aliĝi al iu el tiuj kursoj, kontaktu min ĉe nova adreso, wtrevorsteele@gmail.com.



“Someras” en la kastelo Greziljono

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Por havi la financajn rimedojn cele konservi la kastelon en bona stato, la prizorgantoj luas ĝin al kiu ajn deziras organizi feston aŭ renkonton en ĝi, krom dum la feriotempo. Tiam la esperantistoj renkontiĝas por studi aŭ kanti aŭ havi amuzon aŭ malkovri la regionon.

Ĉijare mi ĉeestis unu el tiuj renkontoj, kies nomo estas “Someras”. Ĝi okazis de la 10a ĝis la 17a de aŭgusto. Komencantoj kaj progresantoj sekvis lingvan kurson, dum la progresintoj kuniĝis matene por malkovri la “poziciigan terapion” – foje ankaŭ nomitan “familia konstelacio”. Tiuj sesioj okazis sub la gvidado de Ankica Jagnjić, specialisto pri tiu terapio, kies celo estas solvi la problemojn de rilatoj ene de la familio komprenigante per aktorado la reagon de ĉiu implikito.

Post la tagmanĝo Alain Delamotte instruis kiel uzi sorobanon (japanan abakon) kun la celo – post longa trejnado – instigi la ĉeestantojn rapide kalkuli eĉ kompleksan dividon aŭ multiplikon, uzante nur siajn cerbojn.

Sekvis kantado de konataj kantoj el diversaj landoj, kies vortoj estis tradukitaj en Esperanton. Jean-Luc akompanis la kantantojn per sia sintezilo.

Tiam venis dancado kun Danuta. Temis pri cirklaĵ dancoj uzataj ankaŭ por kuraci homojn. Ili estis plejofte sufiĉe simplaj, por ke la dancantoj tuj sentu la plezuron kune harmonie moviĝi.

En la vespero la ĉeestantoj de ĉiuj niveloj kuniĝis por aŭskulti prelegon aŭ spekti filmon.

Por ke la prezo por la restado en la kastelo restu malalta, la ĉeestantoj devas laŭ deĵortabelo helpi por prepari la tablojn

antaŭ la manĝoj kaj purigi la ejon kaj la ilarojn post la manĝoj. Tio estas ankaŭ oportuno por konatiĝi kun homoj, kiuj dum la tago elektis malsaman programon.

Dum kelkaj laboras, aliaj ludas, aparte tabloludojn. Estis sufiĉe granda elekto dank'al la ludemuloj, kiuj ne hezitis kunporti siajn proprajn ludojn.

En Greziljono ĉiam eblas akiri biciklon por rapide iri al la apuda urbeto Baugé kaj butikumi.

Kiam iu ne deziras sekvi kurson aŭ aktivecon, li/ŝi povas simple promeni en la granda parko, kiu ĉirkaŭas la kastelon.

Dum la semajno okazis tuttaga ekskurso al malnova muelilo (bildigita), la sola muelilo en Francujo, kie estas ĝis nun produktita glacio, aĉetebla de la lokanoj por gardi la trinkaĵojn malvarmaj en varma tago.

Je ĉiu semajno de la somero la programo estas aparta. Eblas ĝin trovi irante al la retejo de la kastelo, gresillon.org, aŭ uzante eventaservo.org. 



Miaj impresoj pri Kanbero

DAVID RYAN (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)

En oktobro de 2024 mia familio kaj mi pasigis unu tagon en la aŭstralia ĉefurbo, Kanbero. Fakte, nia celo estis Sidnejo sed mi esploris en la interreto kaj mi trovis, ke la aldona kosto de flugo al Kanbero ne estas tiel alta. Tial, ni flugis frumatene de Velingtono al Sidnejo kaj, post du horoj da atendado, ni flugis rapide en malgranda aviadilo al la tre nova kaj moderna flughaveno de Kanbero. La postan posttagmezon ni iris en aŭtobuso de Kanbero al Sidnejo (tri kaj duona horoj).

Ni decidis viziti Kanberon, ĉar ni ne konis la aŭstralian ĉefurbon. Ne multaj nov-zelandanoj vizitas Kanberon. Multaj konas Sidnejon kaj Melburnon sed, malfeliĉe, Kanbero estas ĝenerale konata kiel ne tre interesa/vizitinda urbo.

Mi ĝojas diri, ke ni trovis ke Kanbero estas tre ĉarma urbo. Ni vizitis la tre interesan militan monumenton/muzeon, ni promenis laŭ la lago, ni faris fotojn de la urbo kaj promenis en la arbaro de Monto Ainslie, kaj ni vizitis la novan Parlamentejon.

Kanbero estas sufiĉe vasta urbo kaj estas grandaj distancoj inter la ĉefaj vizitlokoj. Tial, Kanbero estas rekomendinda urbo por tiuj kiuj ŝatas promeni. Mi trovis ke preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj en la urbcentro (oficejoj,

ambasadorejoj, loĝejoj ktp) estas tre modernaj kaj arkitekture belaj. Eble la plej malnova konstruaĵo, kiun ni vidis estis la eksa Parlamentejo konstruita en 1927.

Vizito al la nova Parlamentejo (konstruita en 1988) estis tre interesa, ĉar ni kelkfoje vidas novaĵojn pri politikaj aferoj en Aŭstralio en kiuj ĵurnalistoj intervjuas politikistojn ekster la konstruaĵo. Estis interesa la fakto, ke Aŭstralio havas du ĉambrojn (en Nov-Zelando nur unu). Nova leĝo aprobita en la Ĉambro de Re prezentantoj ne ĉiam estas aprobita en la Senato. Mi volas demandi kiel funkcias tia sistemo! 



Supre: Aŭstralia Militmonumento

Malsupre: Aŭstralia Parlamentejo



Ĉu malkovro en Jakoba Vojo?

DAVID RYAN (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)

Dum vizito al Eŭropo en aŭgusto de 2024 mi pilgrimis laŭ la Jakoba Vojo en norda Hispanio.

La Jakoba Vojo, aŭ Vojo de Sankta Jakobo, aŭ pli bone konata per la hispana nomo "*Camino de Santiago*", estas fama pilgrima vojo ĝis la katedralo en Santiago de Compostela, la plej granda urbo en la provinco de Galegio en nordokcidenta Hispanio.

Pilgrimado al Santiago komenciĝas antaŭ pli ol mil jaroj kiam, laŭ legendo, la korpaj restaĵoj de Sankta Jakobo, apostolo de Jesuo Kristo, transportiĝis

el Jerusalemo al norda Hispanio. La pilgrimado estis tre populara dum la Mezepoko kiam oni konsideris ĝin unu el tri grandaj kristanaj pilgrimoj: al Romo, Jerusalemo, kaj Santiago. La pilgrimo al Santiago malpli populariĝis pro diversaj kialoj ĝis la 1970aj jaroj kiam ekis nova intereso, kaj en 2023 pli ol 440 000 pilgrimantoj atingis Santiagon, el kiuj proksimume duono estis hispanoj kaj la alia duono el preskaŭ ĉiuj aliaj landoj. Kelkaj homoj pilgrimas pro religiaj kialoj, aliaj por ekzerci sin, aŭ por spirita renoviĝa

Daŭras >



Katedralo de Santiago de Compostela

sperto por "trovi sin". Oni ofte diras ke tagoj da marŝado tra la hispana pejzaĝo donas bonan okazon por pensado kaj persona malkovro.

Oni parolas pri "la Vojo" sed fakte estas pli ol 30 itineroj. La plej fama estas la "franca Vojo" (kiu daŭras proksimume unu monaton), kiu komenciĝas en suda Francio kaj transiras la Pirinean montaron. Aliaj vojoj komenciĝas en Portugalio kaj en aliaj regionoj de Hispanio. La Vojo estas grava por la loka turisma sektoro, ĉar tiom da pilgrimantoj devas ĉiutage manĝi, trinki, dormi, kaj aĉeti plastojn por doloraj piedoj. Pilgrimantoj tranoktas en hoteloj aŭ eĉ en gastejoj, kiujn nur oficialaj pilgrimantoj rajtas eniri. Pilgrimantoj povas akiri "pasporton" por kolekti stampojn de survojoj gastejoj, restoracioj ktp. Oni prezentas tiun pasporton por ricevi atestilon je la fino.

Jam aperis kelkaj filmoj kaj multaj libroj pri la Vojo kaj, bonŝance, nur kelkajn

monatojn antaŭ mia pilgrimo, mi vidis novan filmon, *The Way, my way*, de aŭstralia filmproduktisto Bill Bennett. Verŝajne li estas fama en Aŭstralio, ĉu?

Do, en meza aŭgusto mi flugis al Madrido kaj iris en trajno al Ourense (en la loka galega lingvo) aŭ Orense (en la hispana lingvo), kie mi faris mian unuan paŝon por marŝi oficialan distancon de 110 kilometroj al Santiago. Oni rajtas komenci la Vojon ie ajn sed, por ricevi oficialan atestilon, oni devas marŝi almenaŭ 100 kilometrojn. Mi povis elekti alian komencpunkton, sed Ourense ŝajnis taŭga kaj facile atingebla en trajno el Madrido. Por tiuj kiuj konas la Vojon, Ourense troviĝas sur la "Camino Sanabrés".

Kio estas la Vojo? Temas pri marŝadi laŭ bone difinita marŝvojo. La oficialaj itineroj pasas tra arbaroj, kampoj, vilaĝetoj, flanke de ĉefvojoj, supren, malsupren, ktp. Mi ne scias kiu decidis la itineron, sed estas regulaj mejloŝtonoj, kiuj indikas la distancon al Santiago, kun flava simbolo de konko kaj sago por indiki la vojan direkton. Konko estas simbolo por pilgrimantoj al Santiago, kiuj ofte aĉetas konkon por alkroĉi al sia dorssako.

Mi marŝis dum kvar tagoj, entute dum tiu periodo iom pli ol 120 kilometrojn. Bonŝance ne pluvis. Mi perdetiĝis dufoje (la duan fojon maljunulino en balkono de sia domo kriis al mi "ne rekten, maldekstren!"), mi iom esploris dum mia libera tempo, kaj mi devis promeni iomete ekster la oficiala vojo por atingi miajn hotelojn. Miaj piedoj ne komencis dolori ĝis la kvara tago.

Ĉu mi malkovris min dum la Vojo? Fakte, ne. Mi pensis ke eble dum kelkaj tagoj da relative sola marŝado, mi havos tempon por pensi pri mia vivo, sed mi nur pensis pri la doloro de mia korpo



Unu el miloj da mejloŝtonoj

kaj luksa hotelo, kiu atendas min en Santiago. Tamen, eble mi faris kelkajn etajn malkovrojn.

- Mi ofte ŝercas, ke mi estas kamelo ĉar mi ne emas trinki akvon. Ĉiuj aliaj homoj ĉiam portas akvobotelon. Mi ne bezonas akvon. Tamen, la vetero en norda Hispanio estis tre varma kaj, pro tio, mi nepre certigis ke mi portu plenan botelon. Kelkfoje mi soifis kaj, kiam restis nur malmultaj gutoj da akvo en mia botelo, mi komencis paniki. Kun seka buŝo, mi bezonis akvon kaj fine ĝojegis kiam survoje mi trovis fonton de trinkebla akvo. Tial, mi devas konfesi ke mi malkovris la gravecon de freŝa, trinkebla akvo.
- Mi malkovris ke kafo ne gravas (surprize)! Hejme mi ĉiumatene post ellitiĝo tuj preparas teon aŭ kafon. Tamen, dum mia marŝado mi ellitiĝis tre frue (por eviti tro varman posttagmezan temperaturon) kaj trinkejoj/restoracioj ne estis ankoraŭ malfermitaj. Mi pasigis horojn sen kafo! Tamen, mia korpo ne suferis.
- Mi malkovris ke mi estas tre bonŝanca. Mi havis fortajn ŝuojn kaj forĵeteban plastan akvobotelon. Mezepokaj pilgrimoj antaŭ centoj da jaroj ne havis

tiujn "luksojn". Eble ili eĉ ne havis ŝuojn!

- Plej grave, mi malkovris ke ĝenerale mi tro hastas. Dum mia marŝado mi renkontis kelkajn aliajn pilgrimantojn (plejparte el Hispanio, sed aliaj estis el Italio, Slovenio, kaj Portugalio). Ni iomete babilis kaj interŝanĝis kelkajn vortojn sed, post nelonga tempo, mi trovis ke mi ĉiam diras "Do, mi devas daŭri, ĝis poste," kaj mi lasis ilin. Mi ne intencis marŝi dum nur kvar tagojn. Aliaj pilgrimantoj kovras la saman distancon ĝenerale dum 5-6 tagoj, sed mi ne havis paciencon. En la lasta tago mi promenis 34 kilometrojn. Aliaj pilgrimantoj dum tiu etapo ĝenerale faras halton por tranokti en iu vilaĝo. Tamen, mi ne volis fari tion.

Ĉu indas sperti la Vojon? Jes, pro multaj kialoj: ekzercado, spirita aŭ religia renoviĝo, ĝuado de la pejzaĝo. Bonŝance, estas multaj helprimadoj: gvidlibroj, taglibroj de pilgrimantoj, miloj da utilaj filmetoj en YouTube, ktp. Mi estas certa, ke vi plej verŝajne jam konas iun kiu pilgrimis.

Tamen, ne faru kiel mi. Ne temas pri konkurso de rapideco. Marŝu malrapide, faru fotojn, serĉu kafejojn, kaj parolu kun aliaj pilgrimantoj. La Vojo nomiĝas tiel ĉar la vojo estas pli grava ol la celo. 



Feliĉa grupo da pilgrimantoj atingas la celon

Vizito al Rumanio

DAVID RYAN (WELLINGTON, NOV-ZELANDO)

En aŭgusto, dum vojaĝo en Eŭropo, mi vizitis Bukareŝton, ĉefurbon de Rumanio.

Mi ege volis viziti Rumanion, ĉar mi komencis lerni la rumanan lingvon antaŭ du-tri jaroj. La rumana estas unu el la latinidaj lingvoj pro la fakto, ke romianoj konkeris la provincon de Dakio (nuna Rumanio) en la dua jarcento kaj, pro tio, oni komencis paroli la latinan lingvon en tiu fora parto de la Romia Imperio. Post centoj da jaroj, la rumana lingvo naskiĝis el la latina, sed ankaŭ sub influo de najbaraj slavaj lingvoj.

Se oni parolas alian latinidan lingvon, oni trovas ke la rumana estas sufiĉe facila. Mi donos ekzemplojn:

Rumana: *Primul dicționar de Esperanto pentru vorbitorii de limba română a apărut în 1889.*

Esperanto: La unua vortaro de Esperanto por parolantoj de la rumana lingvo aperis en 1889.

Oni facile rekonas la vortojn "*primul*", "*dictionary*", "*de*", "*romana*", "*aparut*". Oni povas eble deveni la signifon de "*limba*", kiu devenas de la latina "*lingua*". Tamen,



Antaŭa "Domo de la Popolo" en centra Bukareŝto

“vorbitorii” kaj “pentru” estas nere koneblaj.

En mia opinio, la rumana plej similas al la itala lingvo, kaj ne estas surprizo, ke rumanoj estas la plej granda grupo de enmigrintoj en Italio (kaj ili reprezentas grandan grupon ankaŭ en Hispanio). Ŝajnas ke proksimume 75% de la vortstoko de la rumana lingvo havas latinan devenon, kaj aliaj vortoj devenas el najbaraj slavaj lingvoj, greka, rusa ktp. Dum mia vizito, kompreni la parolatan lingvon ne estis facile. Tamen, mi povis legi preskaŭ ĉion dank’ al mia lernado aŭ simileco al vortoj en aliaj latinidaj lingvoj.

Bukareŝto estas sufiĉe granda kaj bela urbo kaj oni ofte nomas ĝin “Parizo de orienta Eŭropo”. Kiam Nicolae Ceaușescu

estis ŝtatestro (1965–1989) li ege volis fari bonan internacian impreson pri Rumanio kaj konstruigis longajn bulvarojn kaj grandegajn konstruaĵojn, pro kio li forkurigis enloĝantojn de multaj partoj de la urbo kaj detruigis iliajn domojn. Ekzemple, la Parlamenta Palaco (antaŭe “Domo de la Popolo”) estas la dua (aŭ eble la tria) plej granda konstruaĵo de la mondo, kaj certe la plej peza pro la uzo de multa marmoro. Mi partoprenis ekskurson pri la komunista historio de Rumanio kaj oni klarigis, ke konstruo de tiu konstruaĵo kaj malkontenteco pri la ege alta kosto kontribuis parte al la fino de la reĝimo de Ceaușescu en decembro de 1989.

Daŭras >



Kuirejo en la muzeo pri komunismo

Interesa estis vizito al du muzeoj pri la komunisma epoko, kie mi povis vidi ekzemplojn de tagjurnaloj kaj televidaj programoj en kiuj oni parolis admire pri Ceaușescu kaj lia edzino, Elena (kiu ŝajne kunregis la landon apud sia edzo). Elena ĉeestis nur baznivelan lernejon kaj poste laboris en laboratorio en fabriko. Tamen, oni parolis pri ŝi kiel ege lerta sciencistino kaj ŝi eĉ ricevis honoran doktoriĝan diplomon kaj plurajn premiojn, sed fakte ŝi sciis malmulton pri la fako.

Mi akiris ĝeneralan impreson, ke oni ne ŝatas paroli pri la komunisma periodo. Mi ne vizitis la nacian muzeon pri historio, sed oni informis min, ke ne

estas ekspozicioj pri la periodo post la fino de la dua mondmilito, kvazaŭ la komunisma periodo ne estus okazinta!

Ĉu indas viziti Rumanion? Jes! Sed ne dum somero, ĉar la temperaturo atingis 35 gradojn kaj mi multe suferis. Tamen, Bukareŝto havas belan arkitekturon, grandajn parkojn, kaj multajn preĝejojn, plejparte de la Rumana Ortodoksa Eklezio. Krom Bukareŝto, estas multaj belaj vilaĝoj en Rumanio. Apud Bukareŝto, mi vizitis Brașov en trajno. Tiu malgranda urbo havas ĉarmajn konstruaĵojn kun germana influo, ĉar tie antaŭe loĝis multaj germanlingvanoj. 🇷🇴




Eksa sidejo de la komunista partio, kie ekde la centra balkono Nicolae Ceaușescu faris sian lastan parolon al malkontenta homamaso en 1989



Centra placo en Brașov

Komputila krucvortenigmo

VICKY CRICKETT (TAURANGA)



Horizontale

- 1 Ĉefa ekrana regiono de komputilo por bildsimboloj kaj dosieroj
- 4 Paĝo en la interreto
- 6 Forigi kaj meti tekston aliloke (7,3,6)
- 9 Registrita sonprogramo por aŭskulti
- 10 Datumoj konservitaj kiel unu ero
- 11 Bildo aŭ koloro malantaŭe sur ekrano
- 12 Signo montranta direkton
- 13 Moviĝanta signo sur ekrano por montri lokon
- 15 Aranĝo de klavoj por tajpi
- 18 Surfaco por vidigi bildojn en komputilo
- 20 Transsendi dosierojn al retejo
- 22 Skribi tekston per maŝino
- 25 Meti mesaĝon en retejon
- 26 Malgranda aparato uzata por movi la montrilon sur ekrano
- 27 Foriri de kontoj aŭ retejoj
- 28 Identiga nomo por konto en retejo
- 29 Ĉiuj interretaj paĝoj sub unu adreso
- 30 Kolekto de komputilaj programoj por specifaj taskoj

Vertikale

- 1 Referenco al alia interreta loko
- 2 Loko por interreta konversacio
- 3 Reteja taglibro aŭ artikolaro
- 5 Meti kopiitan tekston aŭ bildon
- 7 Maŝina imitado de homa pensado (10,9)
- 8 Meti programon en komputilon por uzi ĝin
- 9 Sekreta kodo por protekti konton
- 12 Nedezirataj mesaĝoj ofte senditaj amase
- 14 Programo por esplori retejojn
- 16 Identigo por sendi retmesaĝon
- 17 Forlasi programon aŭ retejon
- 18 Transsendi datumojn al via komputilo
- 19 Serĉi aŭ esplori en la interreto
- 21 Maŝino por kalkuli, ludi, kaj labori rete
- 23 Eniri retejon per uzantnomo kaj pasvorto
- 24 Premilo por komenci funkcion

(Solvaj aperoj en la sekva numero:
marto 2025)

Aŭstralia kongreso de Esperanto kaj somerkursaro, Adelajdo

ST ANN'S COLLEGE • 5 – 11 JANUARO 2025



Por esperantistoj kaj lernantoj

- Klasoj de Esperanto je du niveloj
- Vespero de teatro kaj muziko
- Bankedo
- Ekskursoj de Adelajdo
- Prelegoj pri Esperanto kaj aliaj temoj
- Babilado kaj ridado
- Jarkunveno

Instruistoj:

Trevor Steele, fama aŭstralia Esperanta aŭtoro

Hoan Tràn, Esperanto-instruisto el Vjetnamio

Plia informo kaj por aliĝi:
esperanto.org.au/kongreso

KONTRIBUU:

La limdato por la venonta numero estas la 1a de februaro.

Sendu artikolojn, rakontojn, enigmojn, receptojn, fotojn ktp al esk@esperanto.org.au

Agnoskoj pri fotoj

Kovrilo David Ryan

4 David Ryan

5,6 Bildoj kreitaj de AI, bazitaj sur tiuj en la retejo kiva.org

8 Scribe, UK

9 Vladislav Babienko per Unsplash

11 heartmindfocusing.net

13 fortepan.hu, donita de UVATERV

17 Bildarchiv Austria, per Wikimedia Commons

18 Henryk Poddębski, Biblioteka Cyfrowa Politechniki Warszawskiej, per

Wikimedia Commons

19 Du vidoj de la kongresejo. Fotoj: Franciska Toubale

20 Trevor Steele

21 David Ryan

22 David Ryan

23–25 David Ryan

26–28 David Ryan

32 Ilia Dewi (Indonezio) kaj Teofilo Jose Maria de Jesus (Orienta Timoro), ĉe St Kilda dum la aŭstralia kongreso, Melburno, 2015. Foto: Joanne Johns

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
0403 358 941

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Josuo Moss, Stephen Epstein

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

What is this?

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

